# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

http://storm.prohosting.com/jesuo/k55.htm

http://www.iespana.es/esperanto/k55.htm

Ni, hispanaj SAT-anoj kaj partoprenantoj de la SAT-Kongreso okazanta el la 1a ĝis la 7a de julio 2002 en Alikanto,

**Konstatante** ke la nunaj respondeculoj de HALE kiel supozebla LEAo de SAT en Hispanio nek partoprenis aktive tiun ĉi kongreson nek la kunsidojn pri LEAoj,

kaj **Opiniante** ke tiu LEAo ne bone funkcias car ĝi ne plenumas la cefan celon pri kiu SAT klopodas kaj la taskojn asignitajn al la LEAoj,

**Petas** al tiuj nunaj respondeculoj de HALE ke ili demisiu por ke tiuj SAT-anoj kiuj ne akceptas ilian sintenon povu agadi en HALE kaj daŭre funkciigi ĝin kiel hispana LEAo de SAT.

En Alikanto, la 7an de julio 2002

Nº 55 Julio/oktobro 2002

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ Stª Teresa, 22-2º CD,*
*ES30005 MURCIA*
*Libroservo:* vakas.
*Kasisto:* vakas. Nune la redaktoro okupiĝas pri tio.
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* ***nova konto La Caixa*** *nº* 2100 4455 71 0200022454.
*Sen aldona kosto.* La abono kostas 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

***Kajeroj el la Sudo*** *regule interŝanĝas kun:*

1 ***Esperanto****, redaktata de Stano Marĉek,*
2 ***Monato****, de Stefan Maul,*
3 ***Juna Amiko****, de Geza Kuruez,*
4 ***Sennaciulo****, de Kreŝimir Barkoviĉ,*
5 ***SAT-Amikaro****, de Jean Selle,*
6 ***Internaciisto****, de Luis Serrano.*
7 ***La Kancerkliniko****, de Ĵak le Puil,*
8 ***Litova Stelo****, de Petras Ĉielauskas,*
9 ***Liberecana Ligilo****, de Jakvo Schram,*
10 ***Laŭte!****, de C. Baudé,*
11 ***La Migranto****, de Antje Noordewier,*
12 ***SLEA-Informilo****, de P. Persson,*
13 ***Naturista vivo****, de Ervin Fenyvesi,*
14 ***La verda proleto****, de komitato,*
15 ***La Juna Penso****, de Vinko Markov.*
*Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.*



**Kovrilo**: Jen la nova libro de G. Moya, sub grava plendo de kelkaj esperantistoj: HALEano Ramón Manau, eksHALEanoj Marteno Bustin' kaj Miguel Fernández, kaj neniam HALEanoj J. Miguel García Harrianz, Angel García Gutiérrez, Pedro Hernández Úbeda, José A. del Barrio Unquera, José Mª Salguero, Juan Crespo kaj Andrés Fernández Martínez, kiu estas la sola kiu subskribis bone, tio estas, per konstato de sia identigila numero. HALEanoj parolu.

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Enhavo

Redaktore ........ 3
Informoj de la prezidanto ........ 4
Esperantismo ........ 5
La 75-aSAT Kongreso ........ 6
La Esperanta Civito ........ 11
Akvarelo de Brazilo ........ 12
Benino, 2002 ........ 19
HEF kongreso en Alikanto ........ 20
La Kongreso de Verono ........ 21
Anoncoj ........ 22
Enkonduko en muzikon: Instrumentoj, laŭ PIV ........ 23
Rezolucioj ........ 24

# Redaktore:

Antaŭ kelkaj tagoj finis la 75-a Kongreso de SAT en Alikanto, la kongreso kiu estontus alia kanto...



Jes, iusence ĝi estis. Kelkaj membroj de SAT surpriziĝis, ke mi venas. Mi klarigis, ke mi ne koleris lastan jaron kaj eksiĝis senpripense. Mi faris seriozan decidon pri tio, kion mi jam rakontis lastan jaron. Mi plue diris, ke *homoj, kiuj apartenas al SAT valoras pli ol SAT mem, almenaŭ kelkaj el ili*. Tion oni ne komprenas facile, tamen, laŭ tio, kion mi vidis tie.

Mi vizitis la kongreson, tamen, la kongreson, kiun mi ne aliĝis. La unuan jaron en la nuna jarcento, kiam mi ne aliĝas. Mi demandis, ĉu estas aparta statuso por ĵurnalistoj, kiuj deziras informi pri la kongreso, kaj ne estas. Mi demandis, sekve, ĉu eblas pagi po tagoj, same kiel en la kongresoj de UEA. Ankaŭ tion oni neniam antaŭvidis. Nu, kion fari, ĉu foriri kaj ne informi, aŭ resti kaj informi, eĉ *kontraŭleĝe*? Estis malkomforte por mi, kompreneble. Mi *koridorumis* kaj eniris kelkajn prelegojn.

Mi vidis la prezentadon de la Nova PIV, kiun, same kiel la antaŭajn eldonojn, oni vidu kiel konsultajn verkojn, ne kiel dogmo. Estus terure, ke asocio, kiu laŭdifine petas al anoj siaj, ke ne estu dogmoj inter ili, eldonu la dogmon eĉ se nur vortaran. Ne, mi kredas, ke la sinteno de SAT ne estas tia, sed provizi korpon da vortoj, kiujn esperantistoj uzas kaj povas uzi laŭ la konsilataj signifoj, kiujn oni trovas en la paĝo de de la Plena Ilustrita Vortaro. Mi jam vidis, ke kelkaj esperantistoj emas nomumi la novan eldonon la NPIV, tio estas, la Nova Plena Ilustrita Vortaro. Mi trovas tion ne tute sence, ĉar la nova kaj la malnova estas la sama verko, kiu ĝisdatiĝis laŭ la uzo de esperantistoj de la tuta mondo de la jaro 1968 ĝis 2001. La antaŭan PIV (ĉu *APIV*?) oni rigardu kiel historian version de bonega ilo por nia vortprovizo persona, sed oni ne plu uzu, se eblas.

Ĉi tiun numeron denove aperas malfrue. Tio estas, ĉar mi intencis informi pri la Kongreso de SAT en Alikanto, sed tuj poste mi iris al tiu de UEA en Fortalezo, kaj mi ne havis tempon pretigi ĝin ĝustatempe. Mi faras nun per pli da tempo kaj trankvilo, kaj tiel mi klopodos informi pli bone kaj detale pri tio, kion mi spertis dum tiu ĉi somero.

Dum la renkonto de Gvardamar' okazis neformala renkonto, en kiu oni parolis pri la dokumento, kiun ni legas je nia kovrilo. Mi ne komentas la aferon. Nur notas, ke demisiinta estraro ne plu povas demisii, kaj peti, ke la anoj de HALE legu ĝin, kaj komentu. La venontan **Kajeroj**n ni diros nian version, se ankoraŭ utilas, pri tiuj faktoj de tiu dokumento menciitaj.

Sed en la lasta kunveno de la estraro de HALE, okazinta la 25-an de januaro, la estraro demisiis je la peto de la kasisto, kaj nur la Prezidanto kaj la Redaktoro de la bulteno deĵoras provizore, ĝis la venonta estraro regos la asocion. La lastan numeron, tamen, ni diris, ke oni klarigos kial la redaktoro ne demisias pri sia posteno, pro la peto de Marteno Bustin' Benito, eksmembro de HALE.

La argumenton de Marteno mi trovas **sekteca** kaj **netolerema**. Ĝi ne demandas pri kvalito aŭ enhavo de la magazino, nur pri tio, ke la redaktoro *ne estas nia*. Sed kian niecon li postulas? Mi jam klarigis kial mi eliris el SAT. La Sennacieca Asocio Tutmonda ne estas sufiĉe sennacieca laŭ mi, ne estas sufiĉe tutmonda, kaj eĉ ne estas sufiĉe asocia, ĉar simpla ano ne povas proponi por voĉdonado, sed pro malvirto prokutima oni ŝanĝas ĝin **kontraŭstatute**. En la dua paragrafo de tiu statuto, oni legas, ke SAT ne estas dogmiga, ne estas partipolitika, sed estas *kleriga, eduka, kultura organizo* kiu celas *ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj*. Eble mi estas la sola vera ano de SAT, dum ke *kunkartaj* SATanoj ne estas *esence* anoj de SAT. Sed estas alia grava konsidero, kiun Marteno ne prizorgas: ne estas anstataŭanto por la redakto de la magazino, la sola ago de HALE nuntempe. Ĉu Marteno voluntulas?

*Jesuo*

# Informoj de la prezidanto



Estimataj Samideanoj!

Mi estas ĝoja pro la okazo de la Kongreso de SAT en Alikanto, kie almenaŭ sep tagojn la utopio realiĝas. Nia propra utopio de la esperantistaro, kie liberpensuloj, anarĥiistoj, socialistoj, komunistoj, eĉ nudistoj, pensas, parolas, agadas en Esperanto.

Esperanto apartenas al ni. Ĉiuj laboristoj havas la eblecon realigi sian propran idealon per Esperanto kaj en Esperanto. La mondo miras kun ĵaluzo nian propran Esperanton. Tial, ili ne estas kapablaj realigi sian propran mensogon. Esperanto estas la eterna sonĝo, kiu efektiviĝas ĉiun jaron, veriĝas kaj tial ĉesas esti revo. Tio estas nia propra forto, nia supera spiriteco. Kial? Esperanto estas antaŭ ĉio grandego spirita. La angla, la hispana, la franca, havas siajn proprajn grandojn spiritajn, sed sub mono, kiu detruas civilizon kaj ne havas gravan spiritecon.

En Alikanto liberpensuloj, anarĥiistoj, socialistoj, montris grandecon spiritan. Pro tio la mono ankoraŭ ne markis nin.

Ĝis baldaŭ,

*Johano Antono*
*Cabezos Martínez*

# Esperantismo


Giordano Moya surprizas nin per nova libro, kies titolo estas, sendube, tre kara al averaĝa esperantisto. Temas pri prelegoj kaj eseoj, kiujn li verkis de 1965 ĝis 1999, kaj du eseoj, pli longaj, kiuj brile finas la libron: Ĉe la sojlo de la Tria Jarmilo kaj Prognozo pri Esperantismo.

Giordano Moya metas la fingron sur la veran vundon, kiun havas la Esperanto Movado, stagno, kaj priskribas la originon de la malsano, kaj kiel flegi kaj efektive kuraci ĝin..., se vere oni deziras fari tion. La titolo de la libro ne erarigas, esperantismo, kio malsamas al simpla Esperanto. Esperanto estas la ilo..., sed kion oni faru per ĝi? Ĉu oni restu hejme kaj honti pri tio? Ĉu oni ŝajnigu, ke temas nur pri hobio, kaj ne diskutu, ĉar oni estas neŭtrala en gravaj aferoj, kiu sekvigas grandajn katastrofojn, ĉar akraj diskutoj estas evitendaj? Ĉu oni, finfine, kabeu, ĉar Esperanto estas nur alia kulturo, kaj la mondo estas plenplena da kulturoj, kiuj havas multe pli granda kvanto da anoj aŭ klientoj?

Giordano Moya pensigas la leganton pri la origino de la homa socio, pri niaj mankoj kaj bezonoj, kaj ankaŭ pri niaj atingoj. Li ne traktas Esperanton kiel ion strangan al nia mondo, sed kiel ion tute nature aperantan en nia socio, kiu nepre aperus, eĉ se Zamenhof neniam ekzistintus. Tamen, Esperanto nun riskas malaperi, kaj Giordano Moya priskribas la kaŭzojn kaj la procezon per kiu tio okazos. Ankaŭ li opinias pri tio, kion oni povas fari, por prokrasti aŭ eviti la malaperon de Esperanto kaj eĉ la homa socio.

Mi konsilas legi tiun libron malrapide, cerbumante pri la tragikaj mesaĝoj, kiujn la aŭtoro sendas al ni. Eble ĝi helpos nin vidi kian Esperanton ni havas aŭ volas.

Fine, mi aldonas kelkajn frazojn, riveligajn, de tiu libro, laŭ mi mastra verko da pensado pri nia afero:




«Kiam Kolombo malkovris Amerikon, la plejmulto el la homoj estis analfabetaj kamparanoj kaj iliaj patrioj estis siaj naskiĝlokoj». «... Ĉu nuntempe ekzistas popola identeco? Baldaŭ pli ol duono el la monda loĝantaro loĝos en urbegoj kaj en tiaj urbegoj la popolo vere ne ekzistas». «La homaranismo de Zamenhof ne alportas novan ideologion, sed novan konduton». «Legante la esperanto-publikaĵojn kaj legante nian literaturon, oni povas supozi, ke la esperantistoj vivas for de la Tero». «La precipa tasko de la esperantismo devas esti prepari la ĝeneralan pensmanieron por pensi planede, ĉar sen tiu antaŭa ŝanĝo de la ĝenerala pensmaniero, estas neeble organizi la homaron mondskale por trapasi la sojlon al nova universala civilizacio».




Kiel anoncite, la kongreso de SAT komencis la 1-an de julio en hispana urbo Alikanto. Mi intencis ĉeesti, almenaŭ kelkajn tagojn, por informi pri ĝi, sed tiuj *loĝistikaj* kialoj de mi komentitaj en paĝo 3-a, malebligis min. Mi konsilas al la Plenumkomitato de SAT, ke oni kreu novan kategorion de ĉeestanto al siaj kongresoj, *ĵurnalista* aŭ *raportista*, por tio, ke homoj, kiuj deziras raporti objektive kaj pozitive al cetera esperantistaro pri ĝi per ĵurnalo aŭ magazino, ne devu pagi cent eŭrojn.

Mi vizitis la kongresejon, tamen, du tagojn, sed mallonge. Mi pensis uzi la raporton aperontan en ***Sennaciulo*** por raporti pri la kongreso, tamen, kune kun la fotoj, kiujn mi faris en miaj vizitoj al la kongreso 75-a de SAT. Tamen, en la unua kolono de tiu raporto, sur paĝo 99-a, oni legas, ke *Nu, skipo certe estas troigo, ĉar post malfaciloj en HALE, kie oni uzas nuntempe «La Kajerojn el la Sudo» por fifamigi SAT-on kaj laŭdi reakciajn pensojn, restis Marteno Bustin kun sia afablega edzino Liya por duope liveri gigantan laboron kiu organizado de Kongreso estas.*

Tuj poste, raportisto Jakvo klarigas, ke *pro la fakto, ke mi estas SAT-ano mi neniam povas sendi al vi objektivan raporton, tamen mi klopodas*, kio estas strikte la plej pura vero. Ĉar oni devas esti tute nekompetenta paroli objektive por diri tian insultan malveraĵon. Unue, estas atestantoj, pri tio, ke dum la antaŭlasta renkonto de Esperanto en Gvardamar de l' Segura, esperantistoj de Mursjo, Lorko kaj Alikanto ofertis al Marteno Bustin' sian helpon organizi la kongreson de SAT en Alikanto, kaj kelkaj el ni vizitis Martenon tiucele en Alikante poste. Kiam mi mem klare kaj rekte demandis al li, kion ni devas fari, li rifuzis nian helpon, ĉar ni *ne loĝas en Alikanto, kaj sekve* ni *ne povas iri viziti aŭtoritatulojn aŭ fari demarŝojn*. Due, mi dankas al Jakvo pri tiu alta opinio, kiun li havas pri HALE aŭ ĉi tiu magazino, kiuj, laŭ li, povas influi tiomgrade la esperantistaron de Alikanto kaj Mursjo, kiu povas eĉ senigi ordinarajn esperantistojn pri siaj *interna ideo* kaj solidareco, kaj izoligi *la solan veran malreakcian* esperantiston de la tuta hispana sunle-

viĝlando. Tio estas publika konfeso pri ignoro de la hispanaj karaktero kaj ĉefaj trajtoj. Eble en aliaj landoj homoj obeas *tagordonojn partipolitikeskajn*, sed ne ĉi tie. En ĉi tia parto de Hispanio, kie —oni diras— la Suno leviĝas unue (*Levante*), la sola tagordono kiu funkcias kutime estas *vivu kaj lasu vivi*. Bedaŭrinde riparistoj de la mondo nek vivas nek lasas aliajn vivi.

Sed la artikolo de ***Sennaciulo*** publikigita ankaŭ mensogas pro tio, ke estis samideanoj Jacinto González kaj Rodolfo Canet, kiuj multe laboris kaj helpis Martenon, kiam li estis perdita. Ĉu homoj, kiuj ne apartenas al SAT, ne ekzistas? Mi ne havis la ŝancon legi la kongresan libron tiam—oni ne konsideris, ke tion utilas al raportonto pri la kongreso—, sed estas ironie, ke mi ofertis ekzakte tion, kompili la libron. Se kongresinto krikitas la libron iel ajn, li aŭ ŝi sciu, ke ne estis mia respondeco, kontraŭ mia volo.

Ekskamarado Jakvo diras, ke li havas problemon, ke li *trovas nenion pri kio* li *povas plendi*. Evidente li estas blinda, aŭ sekteca, kio estas eĉ pli grava misfortuno. Evidente, ne estas problemo, laŭ li, ke la Rektoro de la Universitato de Alikanto, aŭ la Deano, aŭ Vicdeano de la koncerna fakultato, ne vizitis la kongreson. Evidente, ne estas problemo, ke la Urbestro ne renkontis la kongresantojn. Aŭ la Vicurbestro. Evidente, ne estas problemo, ke la ĵurnaloj de Alikanto ne rimarkis, ke estas Monda Kongreso de Esperanto. Kaj evidente ne estas problemo, ke estis neniu afiŝo ekster la kongresejo, kiu informas, kie la Kongreso okazas. Por hispanoj ne estas tiom malfacile demandi kaj trovi la ejon, sed oni pensu, ke monda kongreso temas ĉefe pri homoj de aliaj landoj, kiuj ne nepre regas la hispanan.



Prezentado de PIV.

Mi ne kritikas Martenon kaj Liyan pro tio, ke la kongreso ne estis brila. Mi konscias pri iliaj limigoj, kaj mi komprenas, ke estas tre limigite tio, kion du personoj povas fari. Mi ne komprenas, ke Marteno, tamen, malestimis helpon, kiun oni ofertis al li. Kaj ne nur nia. Samideanoj de Alikanto plendas, ke ili emis helpi, sed nur je la lasta minuto Marteno konsciis, ke ili ankaŭ estis tie. Evidente, ne ĉiu esperantisto estas membro de SAT, sed tiu organizo agas, laŭ mia scio, *per* Esperanto, kaj ne estante partipolitika, mi ne komprenas, ke ĝi agu sektece. Diris Lanti, kaj ***Sennaciulo*** memorigas al ni ĉiunumere, ke *SATano kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agad-kapablo*. Vere ne diras, sed mi supozas, ke tio implicas ankaŭ eksterasocia. Tiurilate, la Kongreso estis tute malsukcesa.

Mi klarigas al mi iomete pri tiu afero nur per la propraj vortoj de Jakvo Schram en paĝo 103-a de ***Sennaciulo***: [...] *mi ne konsideras min mem esperantisto, sed nur uzanto de la lingvo* [...] Eble li konsideras liajn vortojn modestaj, kaj vere ili estas. Esperantisto *ne* estas — kontraŭ tio, kion oni kutime asertas ekde la kongreso de Boulogne-sur-Mer— *nur* uzanto de la lingvo. Esperantisto ankaŭ havu la *internan ideon*, aŭ li —aŭ ŝi— ne celu alian rolon ol simpla esperanto-parolanto. Tiuj *bulonjeskaj* esperantistoj, sekve, mensogas aŭ ironias ĉiam, kiam ili kantas la himnon *La Espero*, kiu entenas, laŭdifine, la kernon de la Interna Ideo. Mi vidas, ke eblas esti praktika uzanto de Esperanto, eĉ klasbatalanto per Esperanto. Kaj mi konstatas, ke ankaŭ estas diversaj klasoj da esperantistoj, kiuj diverse batalas inter si. Ĉu temas pri


Senstela kongresejo

klasbatalantoj pro Esperanto? Mi esperas, ke *malgraŭ* Esperanto. La solaj armiloj de esperantisto estu paco kaj bondeziro.

Sed mi deflankigas. La kongresan raporton mi celu.

La mardon 2-an de julio, je la kvina de l' vesper' (kiel dirus Federiko Garsia Lorka), S-ro Duc Goninaz prezentis la Novan Plenan Ilustritan Vortaron, kiel




atestas la foto sur paĝo 7-a. Li asertis, ke estas laboro de multe da homoj, inter kiuj rangas Gaston Waringhien mem, kiu dekomence helpis, sed li mortis antaŭ li faris multe. Aliaj kunlaborintoj en tiu ĉi granda verko estas Georges Lagrange, Roland Levreaud, André Caubel, Heinz Hoffmann, Klaŭdo Roux, Serge Sire kaj Wolfram Diestel. De nun la *konsulto* (ke ne la *normo*) jam ŝanĝis. Mi mem ne konsideras tiun ĉi libron *biblio* de Esperanto, sed grava konsulta verko. *KIon tiu homo celas diri?, mi konsultu PIV-n kaj sciu pri tio, kion li celas diri.* Tamen, PIV ne diru al ni kiel konstru nian vortprovizon personan, nur atestu al ni, ke tiu aŭ ĉi tiu vorto ekzistas, kaj tion, kion *normala* esperantisto diras, kiam li aŭ ŝi uzas ĝin. Tamen, ni ne konsideru, ke bona vorto estas tiu, kiu estas en PIV, kaj malbona vorto estas tiu, kiu ne estas en PIV: bona vorto estas tiu uzata, kaj malbona vorto estas tiu neuzata de homo, ĉu estas, ĉu malestas en PIV. Fakte mankas multe da bonaj vortoj en PIV, kaj kelkaj jam estas neuzataj. Eĉ estas vortoj, kiuj ne estas sufiĉe klarigitaj en PIV. Sed ĝi estas, tamen, la plej bona ilo, kiun ni havas por verki, legi kaj eĉ paroli, kiam ni celas interkomprenigi unu la alian. Mi opinias, ke ĉiu esperantisto devas havi kaj uzi tiun vortaron. Ĝi ne estas tiom multekosta. Sep dek eŭroj estas certe malpli ol tio, kion oni kutime elspezas en negravaj aferoj, kaj PIV estu grava por ni, esperantistoj. Ni aĉetu ĝin. Kaj se oni intencas sendi donacon al korespondanto en nepagipova lando, oni rimarku, ke la Nova Plena Ilustrita Vortaro estas la plej bona donaco, kiun oni eblas fari al esperantisto.



Post afabla vespermanĝo, ni ĉeestis la prelegon de Djemil Kessous, kiu temis



Neskandaligitaj esperantistoj interese aŭdas la prelegon pri la lingvoj de Hispanio

pri lia verko ***Universalismo***, kaj ni rakontos en alia paĝo de nia ***Kajero***.

Sur ĉi tiuj linioj estas foto de aŭskultintoj de la prelego de Aŭgusto Kaskero, *La lingvoj de Hispanio*. Tio okazis la ĵaŭdon 4-an de julio. Li tre detale parolis pri la *galega, la eŭska, la hispana* kaj la *kataluna-valensja*. Estis interesaj punktoj, kiujn mi ne sciis: la tiel-nomita eŭska lingvo ŝajnas esti kabineta komponaĵo de kvar dialektoj, kiujn oni parolas en kvar diversaj lokoj de la Vaska Lando. Aliaj interesaj aferoj estas, ke Valensjo (Valencia) estis sendependa lando en Mezepoko, dum ke Katalunio neniam estis tia. La unua verko en tiu lingvo aperis en la deksesa jarcento en Valensjo (*Tirant lo Blanc*), dum ke en Katalunio la unuan verkon aperis en la 19-a jarcento. Ŝajnas moke, ke nun oni diras, ke la vera lingvo estas la *kataluna*, ne la *valensja*! Sed ni jam scias, ke Ŝtalino reverkigis la historion de sia lando..., do aliaj ankaŭ povas fari tion, se ili havas sufiĉe da povo kaj intereso. La prelego de Aŭgusto Kaskero estis tre interesa kaj lerniga. Mi sciis poste, ke li denove diris ĝin en la Eŭropa Forumo okazanta en Verono. Kelkaj katalunistoj skribis al organizantoj de tiu evento, denuncante, ke tiu prelego estas *danĝera*. Mi vidis nenion danĝera en ĝi, sed mi ne komprenas, ke esperantistoj denuncas esperantistojn por ke oni silentigu ilin. Honto sur ilin. Finfine ili ne sukcesis, kaj la prelego estis dirita. Mi bedaŭras, ke pro miaj personaj cirkonstancoj mi ne sukcesis iri al Kongreso de Verono, sed mi klopodos publikigi tiun prelegon en ĉi tiu magazino, por ke ni komentu la aferon, kaj, plej grave, la emon *cenzuri* ĝin.

Tiun tagon, pli frue, ankaŭ estis kunsido de liberpensuloj, gvidata de Max Hollinger, kiun mi ne ĉeestis, bedaŭrinde, kaj post la vespermanĝo rusa Natalia Arolovich prelegis pri la pentrarto de Salvador' Dali'.

Aliajn tagojn mi ne vizitis la Kongreson de SAT, kaj mi ne povas informi pri ĝi, ĉar mi neniam parolas pri tio, kion mi ne vidas aŭ aŭskultas rekte. Plaĉus al mi, ke en aliaj magazinoj oni faru simile prudente.



# La esperanta Civito

Por la legantoj de «Kajero de la Sudo», kiel Senatano, mi provos klarigi, kio estas la Esperanta Civito (poste EC). La tasko ŝajnas grandioza, sed krome, mi postulis, ke mi faros tion sen uzi tro da abstraktaj nocioj, iom pli simple, kvankam ne traktante simplan temon.



Iom da historio: la unua teksto aperinta en ***Literatura Foiro*** 170, decembro 1997, nomiĝis *la Kvintezo*. Al tiu platformo aliĝis pluraj esperantistaj establoj. Reprezantante ilin, la unua Forumo por la EC diskutis che KCE Chodefono (CH), aŭgusto 1998, kaj redaktis proponon de Pakto por la EC aperontan en LF 175, oktobron 1998. Tiun tekston aprobitan de la dua Forumo por EC en Karlovovaro (CZ), julio 1999, en laborkunsido gvidata de Ivo PEYRAULT, sekvis projekto de Konstitucia Charto de la EC. En Sabloneto (IT), la tria Forumo aprobis kaj promulgis tiun ĉarton, en kunsido gvidata de Krešimir BARKOVIČ. La unua sesio de la Parlamento de la EC okazis en Loklo (CH), februaro 2002, unue kunsido de la Forumo, kaj poste de la Senato.

La esperantaj gazetoj ne multe raportis pri tiu longa procezo, kaj nun, jes, ekzistas la EC. Ghi naskas multajn demandojn kaj surprizajn reagojn. Pluraj esperantistoj alparolis min tiel : «Ĉu ni vere bezonas la EC-on? Ĉu niaj nunuaj asocioj ne sufiĉas?» Do, asocio ne estas civito. La EC iam fariĝos internacia jura objekto. Tio montras, ke Esperantio, kiu ĝis nun vivis pere de asocioj, maturiĝas kaj iras al plia ŝtupo. Aliaj diris, post la legado de la Ĉarto: «Tro da leĝoj, da regularoj, tio estas diktaturo!» Nu, ĉu en via lando, eĉ ne diktatura, ne regas leĝoj, por ebligi kunvivadon? Agnoskante tiujn leĝojn, oni agnoskas, ke Esperantio estas komunumo da homoj, kiuj bezonas ilin por kunvivi en sia hejmo, ne plu en tiu «Far West», kie oni arogas al si permeson aĉe konduti, kiel li/ŝi ne farus en sia propra loĝloko. En la Maja numero de ***Sennaciulo*** (1163), Gary MICKLE asertas, ke «La Civito ne estas unikaĵo. Unu esperantista 'ŝtato' jam ekzistis ...» Mi bedaŭras refuti tiun diraĵon, sed la EC estas nek ŝtato, nek teritorio. Bonvolu elekti la taŭgajn vortojn ... Aliaj opiniis : «Flago, kaj himno, kaj festotago, ĉu tio ne estas ridinda afero?» Al tiuj, mi montru, ke ni jam ĉion havis delonge, kiel tradiciajn kulturerojn ellaboritaj de nia Historio.

Vere, ni trapasas gravan momenton, kiam ni ekkonscias, ke Esperanto estas parto de nia propra identeco, kiun ni devas, ne nur flegi, sed fiere montri. En la Senato mem, ekestis debato por difini, kio estas la civitaneco. Rezultis tiom da opinioj kiom da Senatanoj. Laŭ la politika partio (verda, ruĝa, blanka) oni havis malsimilan komprenon, kaj ankaŭ laŭ la personeco. Ne gravas. La EC ekzistas, kiel oficiala organizacio, kapabla rilati kun aliaj oficialaj organizacioj, ĝi evoluos, kaj laŭ mia espero, ĝi utilos al ĉiuj esperantistoj kaj al Esperantio.

*Marie-France*
*CONDE REY*

# Akvarelo de Brazilo




Ĉi tiu kanto venis unufoje dum la malfermo de la kongreso, kantata de baritono. Poste, ni ĉiuj zumis: *Brazil', por mi, Brazil' por ni!*

Kaj certe ni konservos la memoron de tiu *Brazilo brazila, Brazilo nia*, ĉar tie ni vidis rasan integriĝon, mestizan popolon, miksaĵon da kulturoj kaj lingvoj, sub lumo de Esperanto kaj ties Interna Ideo, kiun brazilanoj larĝe havas, se mi povas juĝi laŭ tio, kion mi vidis.

Mi *ekskurzis* kelkajn semajnojn laŭ la sudo de la lando, interkonatiĝante kun mirindaj lokoj: Igvazu', Kuritibo, Pato Branko (ĉu preferinde oni diru *Anaso Blanka*?), kie okazis la Internacia Junulara Kongreso, belega Vitoria, Salvador, iama ĉefurbo..., kaj ĉefe Rio de Ĵanejro, la rivero de l' januaro. Tie koncentriĝas la esencon de Brazilo, mi kredas: mizero, amaso, densiĝo da homoj kaj konstruaĵoj, sed ĉefe ĝojo pri vivo, kaj praktika filozofio de vivo, kiun difinas la kutima frazo rioĵanejra: *Ne graavas!*


La trian de aŭgusto finfine mi atingis Fortalezon de *duetaĝa urbo* Salvador de Bahía.

Fortaleza estas granda urbo, kies loĝantaro grandas ĉirkaŭ du milionoj. La kongresejo estis tre for de nia hoteloj, kiuj estis laŭ la marbordo. Atingi la Kongresejon postulis preni taksion, aŭ uzi aŭtobuson, dum dudek minutojn, almenaŭ. La sistemo, kiun uzis ŭtobusoj en Fortalezo, estas iomete kurioza: ili atingas la centran aŭtobusan stacidomon. De tie, oni denove devas vici por preni novan aŭtobuson al sia celo. UEA antaŭvidis tion, kaj mendis aŭtobusoservon por kongesanoj, sed la prezo estis tro kosta, kaj multaj el ni preferis normalan aŭtobuson, eĉ se ĝi postulas pli da tempo. Vere, ni ferias, ĉu ne?


Fortalezo, la marbordo.

## La kongresa temo

La 4-an de aŭgusto okazis la Solena Inaŭguro de la Kongreso, kun prezento de la Kongresa Temo, kiel kutime en lastaj kongresoj, farite de Humphrey Tonkin. Ĉi foje temis pri *Diverseco — ŝanco, ne minaco*. La temo mem estis prozirgata dum la kongreso de li kune kun Jane Edwards, sia edzino, per tri kunvenoj, kie kelkaj esperantistoj prelegis iomete pri kelkaj koncernaj faktoj okazantaj en siaj landoj, kaj ĝenerala diskutado. La temo turnis laŭ kvin demandoj: 1 Kiuj estas la bonoj kaj malbonoj de globalismo, kaj la bonoj kaj




Eksprezidanto Tonkin prezentas la Kongresan Temon.

malbonoj de lokismo?, 2 Kiuj estas la ĉefaj demandoj pri socia kaj kultura diverseco en via propra socio?, kion oni faras pri ili, kaj laŭ kiuj principoj?, 3 Kion fari pri etnaj kaj lingvaj minoritatoj, kiuj ne havas la rimedojn por defendi sin kontraŭ la efikoj de globalismo?, 4 Ĉu eblas atingi ian ekvilibron inter la avantaĝoj de globalismo (ekz. edukado, sano, komunikado) kaj la avantaĝoj de lokismo (ekz., lokaj kutimoj kaj moroj, kaj la sento, ke oni estas membro de difinita socio)?, kaj 5 Kiun rolon Esperanto kaj la Esperanto-movado povas aŭ devas ludi sur tiu ĉi kampo?

Estis tri kunsidoj pritraktantaj la kongresan temon, kiuj produktis la finan Kongresan Rezolucion, kiun ni legos poste. Mi ne ĉeestis ĉiun, sed el tio, kion mi vidis, mi konstatas, ke en esperantaj etosoj, bedaŭrinde, oni ankoraŭ ne ellasis la kaptilon de naciistoj, kiuj vendas tion, ke *kulturo* kaj *nacia sento* estas io inda kaj defendinda ĉiukaze, kaj ke ni ĉiuj naskiĝas kun *natura rajto* esti aparta, forgesante, ke homaro havas komunan taskon, por kiu oni ne kutime pretiĝas, ĉar oni serĉas malamikojn tie, kie ne estas. Mi eĉ aŭdis hispaninon diri, ke estas absurde, ke valensjanoj volu diversiĝi de katalunoj, kaj samtempe ŝi ne rimarkis, ke estas tiom absurde defendi, ke katalunoj diversiĝu de hispanoj, eĉ pli konsiderante, ke valensjanoj ne estas katalunoj, dum ke ambaŭ ili estas hispanoj.


## Malfermo

Carlos Morales, de Kostariko, diris kial li opinias, ke la kongresa temo kongruas kun la ideoj de la porindiĝena movado.

Renato Korseti paroladis pri la Esperanta Movado, kaj poste oni salutis la kongreson nome de pli ol 50 landoj. Menciindas, ke kvankam estis tie pli ol deko da hispanoj, neniu salutis nome de Hispanio. La afero estis tute nepreparita, kaj eble se mi ne malfruiĝintus al tiu okazo, oni certe proponus al mi, ke mi salutu nome de ĝi. Tamen, mi dankas, ke tion oni ne faris, ĉar mi rezignus pri tiu honoro, pro tio, kio okazis lastan jaron en Zagrebo: la gvidantino de tiu akto, malpermesis, ke la salutanto nome de Hispanio finis paroli, kiam li dirontis, ke li protestas kontraŭ tiuj ŝtatoj, kiuj rifuzis vizojn al esperantistoj de malriĉaj




landoj kaj sekve ili ne povis iri tien, al Zagrebo. Ekskuzo estis, tiam, ke *ne estas la momento*. Verŝajne la momento ne estis dum la tuta kongreso, ĉar mi ne vidis, ke iu ajn plendis pro tio. Eble pezis en tiu mallerta decido tio, ke la Esperanto Movado estu *neŭtrala* kaj sekve ne ĝenu landojn, kiuj povas helpi. Pro tio, estis *poeta justeco* en tio, ke neniu hispano salutis. Fakte, saluto nome de diversaj landoj estas, laŭ mia plej intima esto, sengrava malspritaĵo. Sed mi ankaŭ opinias, ke ni devus aŭskulti ĉion, kion samideanoj havas diri. Tio estas okazo por ke ni aŭskulti diversajn akĉentojn de esperantistoj —fojfoje eĉ bonan—, kiam ili parolas nian lingvon, kaj cete multe da iliaj paroladetoj estas interesaj pro tio kaj eĉ pro si mem. La kutima ekskuzo de oficistoj de UEA estas, ke se oni dirus ĉion, kion oni deziras, ni estus tie multe da tempo. Mi opinias, tamen, ke ni ferias, kiam ni estas en kongreso de Esperanto. La nacioj, kie ni loĝas, bedaŭrinde ankoraŭ ne komisiis nin partopreni en la kongreso kaj klarigi sian sintenon oficialan, do tempo ne gravas tiom multe. Jes, mi scias, ke se la salono estas granda, oni luas ĝin kaj laŭ la tempo oni pagas ĝin. Sed ni venis de eksterlande kaj pagis multe da mono, ĉiuj el ni, kaj mi opinias, ke ni povas




## Grava noto

La babilejo Karelio ne plu funkcias je http://lendir.karelia.ru/chat. Tamen, Joosteto sukcesis rekrei ĝin kaj ĝi pli bone funkcias je http://babilejo.org/, kie samideanoj de la tuta mondo atendas vin je ĉiu horo de la tago. Ankaŭ oni povas havi privatajn diskutojn je http://www.geocities.com/interreto.



permesi al ni mem pagi por tiu lukso. Ĉar **ni estas UEA**, ne la oficistoj aŭ la estraranoj. Ni aŭskultu nin mem. Tio estus bona komenco celi tion, ke la mondo aŭskultu nin. Tion sciinte, oni povas peti salutontojn, ke ili ne troigu en siaj respektivaj mesaĝoj. Sed malpermeso daŭrigi la parolon tute malebligas al salutanto montri sian ĝentilecon, transformante ĉarman, kortuŝan agon en groteskan paradon, kiun oni deziras, ke ĝi finu pkej baldaŭ kiel eble. Pro tio mi ĝojas, ke Hispanio ne salutis, kaj estus dezirinde, ke neniu nacio salutu. Des pli multe pro tio, ke de kelkaj jaroj mi ne plu portas la vorton *Hispanio* en mia identigilo, sed *Sennacio*, kiu devas esti, laŭ mi, la vera nacio de ĉiu esperantisto kongrua kun la ideo de Esperanto kaj tio, kion ŝtatoj faras (ĉu) *nome de ni* hodiaŭ en la mondo. Estas ankaŭ ridinde, ke reprezentanto de SAT salutas, sed ne reprezentanto de Sennacio.

Prezidento Korseti prelegis la Festparoladon kaj tuj malfermis la kongreson 87-an de Esperanto en Fortalezo, ŝtato Ceará, en Brazilo. Pro ĝia intereso, ni prezentas ĝin kompleta ĉi tie, sed pro tio, ke ĝi estas tre longa, mi dezis uzi tre malgrandan litertipon. La leganto uzu lupeon, se vi povas kaj bezonas:

## Parolado okaze de la malfermo de la UK en Fortalezo

### *Enkonduko*

Estimataj oficialaj gastoj, karaj esperantistoj, estas tre bele esti ĉi tie ĉi-matene kun vi. Vi nun atendas de mi la tiel nomatan fest-paroladon. Niaj fest-paroladoj ne evoluis forme tre multe ekde la unua kongreso en Bulonjo-sur-Maro. Profitante la nunajn teĥnikajn rimedojn oni povus tre efike produkti ilin per komputilo. Sufiĉus doni al la komputilo kelkajn informojn: nomo de la urbo, nomo de la lando, numero de la Universala Kongreso, kaj diri al ĝi: “Komencu per la frazo ‘Ne estas sensignife, ke ni kunvenas hodiaŭ ĉi tie en …’”.

Sed, karaj geamikoj, tian paroladon mi ne povas doni al vi. Mi ne povas retorikumi iom ĝenerale pri la beleco de Fortalezo malgraŭ tio, ke ĝi estas urbo bela kaj vidinda. Mi ne povas simple aludi je la mirindaĵoj de Brazilo, kiu ja estas lando mirinda plur-rilate.

Mi sentas la devon kaj ankaŭ la volon paroli al vi pri la veraj problemoj, kiuj estas antaŭ ni, antaŭ la Esperanto-movado, en ĉi tiu momento.

### *Ĝenerale*

Antaŭ ĉio ni diru kelkajn vortojn pri la monda situacio. La nuna mondo estas organizata surbaze de centroj kaj periferioj, kiel ĉiam estis organizata la mondo.

La apartaĵo estas, ke unu el tiuj centroj momente havas pli da potenco ol la aliaj centroj. Surbaze de tio pluraj realistoj konkurencas, por deklari, ke la historio de la homaro finiĝis, kaj ke prefere oni estu realisma kaj akceptu la realan situacion. La lingva flanko de tio estas en la admonoj, kiujn ni aŭdas ĉiutage: “Ho ĉesu! La angla jam venkis!”. Tamen similaj admonoj (kvankam tiam temis eble pri alia lingvo) estis aŭdataj ankaŭ en la tempo de Zamenhof, kiel atestas unu el niaj konataj poemoj:

*“Ho ĉesu” mokante la homoj admonas*
*“ne ĉesu ne ĉesu” en kor’ al ni sonas.*

Kaj tamen … se la historio efektive estus finiĝinta, kial nun pli ol iam ajn en la pasinteco oni estas devigata provizi sin per armiloj kaj protektoj?

Mi kredas, ke la realistoj eraras, kiel ili ĉiam eraris. Ili asertis, ke estas ridinde pensi ke iam sklaveco ĉesos ekzisti, ke estas ridinde pensi, ke la grandaj potencaj landoj liberigos siajn koloniojn, ke estas ridinde pensi, ke lingvo inventita de knabo en nekonata urbeto en orienta Pollando disvastiĝos tra la tuta mondo.

Do, mi pensas, ke ankaŭ nun realistoj malpravas, kaj ke la nunaj potenco-rilatoj en la mondo ne estos eternaj. Ĉiukaze, kaj sendepende

de la situacio nuna aŭ estonta en la mondo, ni nun kiel antaŭ unu jarcento rifuzas la logikon laŭ kiu fortuloj rajtas altrudi al malfortuloj sian kulturon kaj sian lingvon. Ni estas movado por diverseco en la mondo.

Ne estas mi, kiu diras tion. Aŭskultu kiel bele Zamenhof mem en la dua kongreso en Ĝenevo en 1906-a esprimis tion:

*"... al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj".*

"Justeco" diris Zamenhof, kaj ĝuste por paroli pri ĉi tiu justeco inter ĉiuj popoloj, grandaj kaj malgrandaj, ni venis al Fortalezo. La rajto resti malsama, la rajto je diverseco, kiel vi jam aŭdis, estas fakte la temo de nia kongreso.

## *Lingvaj Homaj Rajtoj*

Por esprimi la "sanktan, grandan kaj gravan" ideon, laŭ iom pli nuntempa maniero, ni povas diri, ke "ni laboras por la lingvaj homaj rajtoj de la homaro". Ĝuste tiu estas la nomo de la granda informkampanjo pri homaj lingvaj rajtoj kaj pri Esperanto kiel garantianto de ili, kiun Universala Esperanto-Asocio nun lanĉas.

Ĝi volas esti ampleksa inform-kampanjo, kiu ree proponu la uzon de la internacia lingvo Esperanto kiel ilo de justeco, eventuale ankaŭ, sed ne nur, kiel ilo de efikeco.

Justeco en la rilatoj inter malsamlingvaj gentoj povas esti atingita, laŭ ni, nur per la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto. Mi ne donos kromajn detalojn pri tiu kampanjo, sed vi aŭdos pri ĝi abunde dum la semajno.

Cetere, ankaŭ pri homaj rajtoj ni esperantistoj devas reaserti nian tre fruan malkovron de ili, pli-malpli duonan jarcenton antaŭ la subskribo de la konata *Deklaracio pri Homaj Rajtoj*. En tiu sama kongreso de la jaro 1906-a estas alia frazo de Zamenhof: *"Mi venas al vi el lando, kie multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo."*

Ĉi tiu Zamenhof, malgraŭ siaj okulvitroj kaj barbo tipaj de la komenco de la pasinta jarcento, estis vera modernulo, eventuale eĉ postmodernulo.

Sed ni devas pruvi ke ni ne estas malpli postmodernaj ol li.

## Konkretaj Problemoj

Se nun ni moviĝas de la grandaj temoj kaj de la grandaj kampanjoj al la ĉiutagaj, konkretaj problemoj, kiujn Universala Esperanto-Asocio, alivorte ni ĉiuj, devas fronti, mi povus fari al vi longan liston, sed prefere mi tuŝu nur la ĉefajn:

*__La Esperanto-movado kreskas__. Vi devas fidi min, ĝi kreskas. Se ne estus tiel mi ne ricevus petojn pri inaŭgura artikolo de la mongolaj aŭ de la iranaj esperantistoj. Se ne estus tiel, mi ne estus petata daŭre vojaĝi tra Eŭropo jen por inaŭguri la novan sideojn de la Brita Esperanto-Asocio, jen por instrui en universitataj kursoj en Pollando, jen por paroli al hispanaj kongresanoj. Se ne estus tiel, mi ne devus okupiĝi pri la lernolibroj, kiujn oni devas uzi en Zambio aŭ ĉe la afganaj rifuĝintoj, kiuj lernas Esperanton.

Se ne estus tiel, verŝajne ni hodiaŭ ne estus ĉi tie en Fortalezo, se ne estus tiel artikolo en gazeto de Barato/Hindujo aŭ anonco en maroka ĵurnalo ne instigus dekojn homojn peti informojn pri Esperanto.

Tiu kresko, tamen, enhavas problemojn. Ni kutimis esti ĉefe eŭropa movado kun kelkaj tradicie fortaj landaj movadoj en orienta Azio kaj kun tradicie fortaj landaj movadoj en la plej orientaj landoj de Eŭropo. Nun ni transformiĝis pli kaj pli al vere tutmonda movado. Sed leviĝas inter ni en la ekonomie evoluintaj landoj kaj niaj samideanoj tra la mondo kurteno fera, multe pli fera ol antaŭaj kurtenoj: temas pri ekonomia kurteno.

Ni ankoraŭ ne sukcesis trovi taŭgan manieron por enplekti en la Esperanto-komunumon, en UEA, la esperantistojn, kiuj loĝas en landoj kun malsamaj gradoj de ekonomia evoluo, por doni ekzemplon: de Rumanujo ĝis Zimbabvo. Certe ni pagas la kotizojn por kelkaj per la donacoj de la riĉaj esperantistoj. Sed la grandaj amasoj de tiuj esperantistoj restas ankoraŭ neatingeblaj kaj neatingataj.

Mi petas vin turni nun viajn pensojn al tiuj multaj esperantistoj, kiuj volis esti ĉi tie kun ni hodiaŭ, sed ne povis. Tra la lastaj monatoj mi ricevis serion de kor-ŝiraj komunikoj de esperantistoj el Bulgarujo, el Pakistano, el Nepalo, el multaj afrikaj landoj, kiuj sendis al ni bondezirojn kaj informis pri sia granda revo esti ĉi tie. Ni povis helpi nur kelkajn kaj nur el amerikaj landoj.

Tio cetere ne estas io nova. Nia amiko Zamenhof en la jaro 1910-a, okaze de kongreso en Vaŝingtono, la unua en Ameriko, konstatis: "*Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, esperantistoj, ne estas homoj riĉaj ...*".

*La Esperanto-movado kreskas ankaŭ alimaniere. Ekzistas amaso da homoj tra la mondo, kiuj renkontas Esperanton ne plu ĉe la tradicia kurso (ĉiun ĵaŭdon vespere je la 6-a en la sidejo de la loka klubo), sed en la mondo de la komputila reto.

Tiuj homoj havas aliajn lojalecojn kaj aliajn bezonojn. Ili apenaŭ komprenas, kial homoj volas renkontiĝi kun aliaj homoj en difinitaj ejoj, al kiuj oni devas vojaĝi en malrapidaj aŭtobusoj tra la urba trafiko. Ili apenaŭ komprenas, kial homoj volas partopreni universalajn kongresojn en foraj landoj kun tedaj festparoladoj, kiujn oni devas aŭskulti ĝis la fino sen eblo simple forviŝi ilin.

Ĉu oni ne povas fari ĉion ĉi sidante antaŭ sia komputilo?

Multaj el ni verŝajne estas tro maljunaj por kompreni ilin, kaj do ni ĝojas ankoraŭ renkontiĝi fizike kaj babili en la haloj de la kongresejo. Tamen ni devas fari ion ankaŭ por ili, malgraŭ tio, ke konceptoj kiel "kotizo", "aliĝo", ktp. estas por ili same estingiĝintaj kiel la dinosaŭroj.

Ĉi-kampe, mi fieras raporti al vi, dum la lasta jaro UEA faris pli ol ĝi faris dum la antaŭaj kelkaj jaroj, kaj ni jam laboras peri projektoj, kiujn mi ŝatas citi. Mi citu nur ekzemplojn: la reta membreco, la ricevado de la revuo tra la reto (transsaltante la presejon, la paperon kaj la poŝtiston), la ebleco ŝanĝi vian adreson en la inform-banko de UEA rekte el via hejmo, la klopodo, bonvolu aplaŭdi, ebligi rektan konsulton de via konto ĉe UEA en plena respekto de via sekureco kaj privateco. Temas pri projektoj ankoraŭ ne finrealigataj, kaj pri kiuj miaj kolegoj forte avertis min, ke mi ne menciu ilin, ke mi estu prudenta. Sed mi estas malprudenta.

## *La ĵus pasinta jaro*



Benina infano ricevas diplomon pri Esperanto la pasintan aŭguston.

Kelkaj el vi aŭdis miajn vortojn ĉe la fermo de la antaŭa Universala Kongreso en Zagrebo.

Tie mi diris esence:

-ke mi volas esti la prezidanto de ĉiuj esperantistoj;


- ke tio, kio gravas, en la vivo de Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj estas la duopo:

- produkti esperantistojn
- produkti servojn por esperantistoj.

Vi rajtas demandi min, kio okazis intertempe.

Kiam temas pri prezidanteco de ĉiuj esperantistoj, kio, mi reklarigu, signifas, ke UEA efektive transprenu la gvidon de ĉiuj esperantistoj, mi povas diri ke la afero progresas. Interalie multe evoluis la kunlaboro kun eŭropaj esperantistoj. Kune kun ili ni starigis en Bruselo la tiel nomatan Komunikad-Centron de Eŭropa Esperanto-Unio kaj Universala Esperanto-Asocio, kiu jam en kelkaj monatoj atingis konsiderindajn sukcesojn: ĝi revenigis la Komisionon de Eŭropa Unio al pli sobraj deklaroj koncerne la lingvajn homajn rajtojn de neanglalingvaj eŭropaj civitanoj; ĝi aperigis artikolojn en gazetoj, ktp.

Ni ankaŭ dum la pasinta jaro fortigis la tiel nomatajn regionajn komisionojn, kiuj nun gvidas la laboron en la unuopaj kontinentoj. Ĉi tie mi ne povas ne peti aplaŭdon por la Amerika Komisiono de UEA, kiu daŭrigis sian modelan laboron tra la kontinento, kaj eĉ sukcesis starigi oficejon en Braziljo. La oficejo, kies starigo estis ebla danke al la kunlaboro kaj subteno de Brazila Esperanto-Ligo, ankoraŭ pli intensigos sian laboron kaj ankaŭ helpos al UEA pri informado.


Carlos Morales parolas pri indiĝenaj dialogoj

Kiam temas pri produktado de esperantistoj kaj produktado de servoj por esperantistoj, mi devas diri ke UEA decide interesiĝas pri informado (petu informilojn kaj vi ricevos. Mirinde, ĉu ne?) kaj pri instruado. La efikojn eble ni komencos vidi en la venonta jaro. Sed mi insistos pri tio, kaj daŭre ĝenos ĉiun ajn, kiu hazarde troviĝos antaŭ mi, ke se ni ne produktas esperantistojn, ĉio cetera estas vana.

Certe ni daŭrigis ankaŭ nian diplomatian laboron ĉe registaroj, ĉe Unesko (kies reprezentanton ni salutas hodiaŭ inter ni) kaj ĉe UN (kiun reprezentas ĉi tie Carlos Morales), sed se vi permesas al mi diri mian opinion, mi diros ĝin per la vortoj de Zamenhof, diritaj en la jam citita kongreso en Vaŝingtono. Bonvolu kompreni lin kaj pardoni lin. Li uzas iom tro malneŭtralan esprimon: "popolaj amasoj", sed li estis iom tia. Do, li diras: "*La celo, por kiu ni laboras, povas, esti atingita per du vojoj: aŭ per laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta.*"

Ĉiukaze, mi ne povas fermi mian paroladon sen du grandaj dankoj:

- Unu estas por la Ĝenerala Direktoro kaj por la oficistoj en Roterdamo, Bruselo, Lomeo, kiuj kapablis ne nur elteni min, sed ankaŭ fari multan laboron en tre malfacila situacio;
- La dua estas por miaj kolegoj en la estraro kaj por la estraranoj de TEJO, nia junulara sekcio, kaj ILEI, niaj instruistoj, kies eltenkapablo kaj laborkapalo estis tia, ke mi ĝojas havi ilin kiel kolegojn.

Dankon pro via atento.

Post la prelego salutis diversaj homoj, inter ili la nepo de Zamenhof, Sr-o Louis Zaleski-Zamenhof, Carlos Morales, kiu parolis pri la projekto *Indiĝenaj Dialogoj,* kaj Patrick Gallaud, reprezentanto de Unesko, kiu legis vortojn de John Daniel, asista Ĝenerala Direktoro pri Edukado, de Unesko.

Resumi la kongreson ĉi tie estas komplika afero, ĉar mankas spacon. Tamen, mi mencios nur du menciendajn aferojn:

## ATEO

La kvaran de aŭgusto renkontis membroj kaj simpatiantoj de Ateista Tutmonda Esperanta Organizo.

Ne eskapis mi mem al bato hazarda, de ano de la estraro, kiu sindemandis laŭte, ĉu *viro, kies nomo estas Jesuo, povas esti atea*. Oni rezoluciis sendi artikolojn kaj kontribuaĵojn al redaktoro por la nova numero de la revuo, *Ateismo*, kaj ankaŭ oni decidis ŝanĝi la estraron, elektante novan Prezidanton, Claude Nourmont, Vicprezidanton, Neil Blonstein, kaj la aliaj anoj, kasisto, sekretariino kaj redaktoro, restas la samaj, kiujn oni elektis en Zagrebo lastan jaron.


Oni pretigis la skemon de la kunsido pri *Ateismo nuntempe*, kiu okazis la 9-an de aŭgusto, kun intervenoj de Gavriel Zeevi, Jozefo Lunazzi, Anna Löwenstein kaj Orlando Raola, kiuj parolis pri religiaj tendencoj en Proksima Oriento, Scienco kaj Religio, kaj Ateisma Edukado de Infanoj. Notinde estas, ke la ĉambro, ne malgranda, ne sufiĉis por ke ni ĉiu sidiĝu. La diskuto estis vigla kaj viva, ne mankante la kutima dikredan-

tulino, kiu deziris konverti nin. Ni, tamen, sukcesis trakti ŝin ĝentile, kaj nur detruis ŝiajn argumentojn per klaraj kaj mallongaj vortoj. La etoso estis tre amika, kiel konvenas en esperanta renkonto, kaj ni finis kun la sento, ke la faka asocio ATEO jam finfine relanĉiĝis, komencante vere novan epokon, elirinte finfine de sia stagnado.

## MEL

La Muzika Esperanto Ligo nun trapasas malbonan momenton. Ĝia prezidanto kaj samtempe direktoro de la Internacia Ĥoro, samideano Dimitar Terziev, mortis en sia lando du semajnojn antaŭ la kongreso. La lastan jaron, en Kroatio, li direktis ĝin por la lasta fojo.

MELanoj kutime renkontas ĉiujn tagojn dum la kongreso por pretigi koncerton, kiujn ni kantas dum la *Internacia Vespero*, la antaŭlastan tagon de la kongreso. Bedaûrinde, ni sciis pri lia forpaso ĵusalvenante al kongreso. Post kelkaj provoj solvi la problemon, ni finfine sukcesis organizi la aferon, per gvidado Helen Fantom, kiuj organizis efike niajn renkontojn, kaj Alan Biŝop, kiu tre profesie direktis la ĥoron. La kantoj de ni pretigitaj kaj kantitaj en la Internacia Vespero estis kanono *Kantu ni en rond', Bela idealo*, komponita de esperantisto Hose' Kaliksto, *Mucuripi*, kiu estas plaĝo apuda al Fortalezo, kaj *Akvarelo de Brazilo*, de Ary Barroso kaj



Tarsicio Lima kantas.

vortoj esperantigitaj de Tarsicio Lima, kiun ni vidas en la supra foto.

Dum la kongreso ankaŭ ni intencis revivigi MELn, sed ni ne sukcesis kunveni. Ni faros tion antaŭ la venonta kongreso, espereble. MELanoj, kiuj legas tion, atentu al revuo ***Esperanto***, kie oni diskonigos la estaton de la afero.

## Tarsicio Lima

Li partoprenis ĉiun muzikan eventon de la kongreso.Li respondecis pri la artisma flanko de la kongreso. Kaj ne nur oficiale. Li ankaŭ kantis kaj akompanis sin en la Malfermo, en la Nacia Vespero, kaj eĉ en la Internacia Vespero, li regalis nin per siaj adaptoj de kantoj, inter ili ***La espero***. Ankaŭ al li ni ŝuldas la esperantan version de *Akvarelo de Brazil'*.



La Internacia Ĥoro estas la heredaĵo, kiun Dimitar Terziev lasis al Esperanto

Internacia Ĥoro kantas en la Malfermo

# PREMIO-TAGO EN LERNEJOJ (BENINO), 2002

En Benino estas de kelkaj jaroj lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton. La ideo pri la enkonduko de Esperanto en beninaj bazaj lernejoj ekis kun la organizo **Esperanto-afrik'** fondita de samideano Jean Codjo kun la helpo de



esperantistoj enlande kaj eksterlande, precipe Esperanto-Stuttgart (Martin Schaeffer, Germanio), pere de kies komunikaj materialoj disponigitaj kadre de esperanto-oficejo en Afriko. Notindas tamen mencii, ke la efektivigo de la instruado okazas pro la kunlaboro de kelkaj beninanoj inter alie Pierre Houenavo (lernejo *Jules Verstraeten* de Kodji), François Hounsounou (lernejo *Aguidahoue*), Gaston Houssou (Lernejo esperantista de Tazoume)...ktp. Estas laŭtradicie rimarkinda, ke je la fino de ĉiu lerno-jaro oni disdonas premiojn al diligentaj lernantoj en ĉiuj lernejoj. La premioj



konsistas el ĉiuspecaj donacoj senditaj de esperantistoj el Eŭropo, Japanio,... Denove tiun-ĉi lerno-jaron okazis la premio-tago en kelkaj lernejoj (Lernejo de Kodji, Jules Verstraeten kaj tiu de Aguiahoue). Modestaj estas la premioj, sed ĝojigindaj.

La 1an de aŭgusto 2002, Beninan sendependan festotagon, okazis la ĉi-jara premio-tago en du lernejoj. Multaj infanoj ricevis kajerojn, skribilojn kaj vestaĵojn ĉefe senditaj de belgaj esperantistoj (Flora, Jules Verstraeten, Agnes Geelen....), de Germanio (Sabine Darbellay, Henning Hauge...), de Kanado(Allison Broadbent-Codjo). Vestaĵoj uzitaj venis de Francio (Passarela Gisele, Francoise Goetz), Japanio (Saoinji Masayuki...). Notindas daŭre mencii la senĉesan helpon de aliaj esperantistoj kiel Gunter Ebert (20 eŭroj, Germanio), Robert Dion (50eŭroj, Francio) kiuj aldone al tio sendadas ankaŭ esperantajn legotekstojn. Tiu sumo ege kontribuis al aĉetado de pliaj didaktikaj

materialoj. Tio ebligis, ke ĉiu infano ricevis almenaŭ unu kajeron, tri skribilojn inter alie unu krajonon. Mapo estas aparte donacita al la lernejo de Aguidahoue. La ceremonion ĉeestas ankaŭ aktiva esperantisto el Lokossa, Gbadamassi Latifou. Esperantistoj el Hispanio, Jesus de Las Heras Jimenez kaj Sudulo subtenas la projekton per la malfermo de hejmpaĝo rilate al la lernejo en Aguidahoue (http://www.iespana.es/Esperanto_es/benino , http://storm.prohosting.com/jesuo/k54lako.htm).

Por fini ni aparte deziras danki al Ivo Durwael kaj Agnes Geelen, pere de kiuj esperantistoj el Belgio donacis monon por kontribui al konstruado de la dua parto de la lernejo Jules Verstraeten de Kodji. Al tio ankaŭ ege kontribuis Renato Corsetti. La konstruigo ne ankoraŭ komencis, ĉar ni ne ankoraŭ atingis la disponigendan sumon por lanĉi la konstruadon. Informojn tiurilate ni disponigos al vi siatempe.

Tiun-ĉi okazon ni kaptas por atentigi ĉiujn bonvolemulojn al la ideo, ke ĉiuspecaj donacoj daŭre restas bonvenaj venontajare.

Por informoj aŭ donacoj vi bonvolu direkti vin al:

Francois Hounsounou
(eventuale al Pierre Houenavo)
BP 226 Lokossa-Mono
Benin
Afriko

## HEF-KONGRESO

Kiel atendite la HEF-kongreso ne altiris la atenton de multaj E-istoj. Nur grupo da amikoj-konatoj ĉeestis por somerumi en Alikanto kaj klaĉi iomete en la internacia lingvo. Sed tamen 3 interesaj programeroj donis kvaliton al la ariĝo. La du prelegoj de la ĉina Sr-o Peng Zhenming, kiu parolis pri la ĉina lingvo kaj montris videobendon pri sia klubo E-ista en Ĉinio. La aliaj du programeroj estis ĉefrolulataj de Miguel Gutiérrez Adúriz. Li parolis pri la prononcado, kaj li emfazis la problemojn de la hispanoj por bone paroli. Li prezentis novan poŝvortaron sed ne la jam konata de ĉiuj «Amika», ne; li prezentis alian «2002» kaj promesis plibonigi ĉi tiun kaj eble post kelkaj jaroj ni havos, la tiel longe esperatan, «Amika». Ankau Tonyo del Barrio donis bonan prelegon pri elstara E-isto de antaŭ la hispana intercivitana milito: Emilio Herrera. Aŭgusto Casquero, kiel preskaŭ ĉiam, surprizis nin dirante ke li pretas organizi, denove, la UK-on en Valencia. Laŭ li Valencia estas nova urbo kaj la urbestraro estas aperta por tiaj eventoj. Ni ĉiuj devas apogi lin, almenaŭ kore kaj mense.

*Pedro Garrote*

Miaflanke, mi aldonu ke Ana Manero prelegis pri E-informado en foiroj kaj similaj aranĝoj. La parolado menciita far Marcos Cruz, de Sergey Maltsev, havis kiel titolon: «Esperanto dum la bolŝevisma tempo en Rusio» kaj priskribis la drastan evoluon de la movado ekde entuziasma apogo de la unuaj gvidantoj de Sovetio ĝis la terura persekuto fare de Stalin.

Ankaŭ mi aldonu mian personan impreson, ke la Kongreso estis iomete fiaska pro la malgranda nombro da kongresanoj, ĉirkaŭ 40. La ŝanĝo de dato (unue oni antaŭvidis okazigi ĝin samtempe kun la SAT-kongreso, kaj poste oni ŝanĝis al la unuaj tagoj de Aŭgusto) sendube influis. Ankaŭ, miaopinie, estis eraro okazigi tri monatojn antaŭe la E-Kongreson de Valencia kaj Murcia en La Vall d'Uixó, ĉar se oni estus okaziginta ĝin en Alicante samtempe kun tiu de HEF, sendube ĉeestintus pli da valencianoj kaj murcianoj.

*Darío Rodríguez López de Silva*

# La kongreso de Verono,

de Anøelo La Manna

Dum du jarmiloj la fortikaĵoj de Verono



fermis la urbon al fremduloj. Nun la epoko kiam homoj en Eŭropo estis apartigitaj per mil landlimoj, finiĝas, kaj la fortikaĵoj de Verono brakumas karese mil kaj mil ulojn el diversaj landoj, kiuj estas allogitaj tien per la belo, la historioj, la ĉarmo, la riĉo kaj la gastemo de la tiu urbo. Esperantistoj kunportis propran aldonon al tiu liberema etoso. Ekde la 23a ĝis la 28a de Aŭgusto, 280 esperantistoj kunvenis en Verono, pro la 5a Eŭrop-Unia Esperanta Kongreso.

Preskaŭ ĉiu EUa lando estis raprezentiita je la kongreso, krome multaj kongresanoj alvenis el ne EU landoj, kiel Latvio, Litovio, Ĉeĥio, Bulgario kaj Kroatio. La plej fordevena partoprenanto, estis Ikuko Hirota, kongresanino 224, el Japanio.

Ni ĉiuj estas feliĉaj pro la falo de politikaj bariloj en Eŭropo, sed ankoraŭ unu limo ekzistas inter homoj: lingvaj diferencoj. Eŭropa Unio agnoskas 11 naciajn lingvojn, kaj aldone, multaj EUanoj parolas minoritatajn lingvojn. Ni demandas: ĉu eblas efike krei veran eŭropan komunumon, se ekzistas baro kiu apartigas persone la homojn? Ĉu eblas konstrui eŭropan societon, se homoj malfacile povas komuniki inter si? Ĉu eblas krei novan popolon, kies anoj ne povas libere amikumi, labori, ami, diskuti, disputi kaj amuziĝi kune? Ĉu estas rajto havi eblecon fari tion? Ĉu eblas solvi la problemon, burokratie enkondukante unu lingvon kiel oficialan lingvon de ĉiuj eŭropanoj? Ĉu tio detruos kulturan trezoron de nia kontinento? Ĉu tio respektas la rajtojn de homoj? Tiu estis la temo de la kongreso: «Efektiva Lingva Egaleco: ĉu Rajto de Eŭropanoj?».

Esperantistoj dum tiuj tagoj rilatigis la lingvajn problemojn de Eŭropa Unio al centjara sperto de la esparantista movado. Pri la temo, prelegis prof Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA, d.ro Umberto Broccatelli, eksa prezidanto de Esperanta Eŭropa Unia Komitato (EEU), Claude Longue-Epèe, prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, Daffyd ap Fergus, ĝenerala sekretario de EEU, kaj gazetisto aktiva en la disvastigo de esperantaj ideoj, Seàn O' Riain, irlanda diplomato kaj nova prezidanto de EEU.

John Wells kaj Augusto Casquero de la Cruz, aldonis altvalorajn kulturajn informojn al diskutoj. La unua, parolis pri la evoluo de alfabetoj en Eŭropo, la dua pri la hispana sperto en lingvaj politikoj.

Tre grava estis la kontribuo de la juna franco Xavier Dewidehem, prizorganto de projekto «Euroscola en Esperanto», kiu ebligis jam tri fojoj liceanojn el diversaj eŭropaj landoj, viziti la Eŭropan Parlamenton, partopreni

diskutojn kiel «veraj parlamentanoj», kaj komuniki danke al Esperanto. Malgraŭ la klopodoj de Xavier Dewidehem, post tri sukcesaj okazoj, funkciuloj de EUa Parlamento ne kunsentis la daŭrigon de la projekto. Subteno de ĉiu esperantisto nepre necesas, por ke tia bela sperto ade reokazos. Fine, Humphrey Tomkin donis al spektantoj interesan prelegon pri «Shakespeare, Italio, Internacia Lingvo».

Flanke de tiuj seriozaj aferoj, pli amuzaj, sed ne malpli seriozaj aferoj, okazis. Lingvo ja estas ilo por rilatigi homojn, do koncertoj, ekskursoj, «sociaj okazoj», kaj paŭzoj, estas nepre necesaj kaj gravegaj en cxiu esperanta kunveno!

Eble, tiu kongreso estos historia etapo meze de la vojo al enkonduko de Esperanto en Eŭropaj Instancoj, eble ĝi estos historia etapo meze de la vojo al Fina Venko. Sed, ja estis por ĉiu partoprenanto bona ŝanco por viziti belegan urbon, ĝuj inteligentajn vortojn kaj koni novajn amikojn!

## Anoncoj

La venontan numeron ni publikigos la kandidatiĝojn al ni prezentitajn por voĉdonado pri la nova estraro de HALE. Notu, ke mankas nur kelkaj tagoj, por sendi ilin al Prezidanto de HALE, aŭ al la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo***.

Pro la abunda materialo prikongresa en ĉi tiu numero, mi ne povis meti la kutiman ĉapitron de ***La Faraono***, de Boleslaŭ Prus, laŭ la traduko de Kabe. La venontan numeron mi klopodos meti du por kompensi la avidan leganton.



# Enkonduko en muzikon

## *Instrumentoj, laŭ PIV*

Kiel ni jam diris, dum la alikanta kongreso de SAT oni prezentis la novan Plenan Ilustritan Vortaron, kiun ĉiu bona esperantisto devus havi por almenaŭ povi sindefendi kontraŭ dogmismo de PIVanoj. :-) Ni komentas paĝon 786-an, kiu prezentas la muzikilaron. Jen la nomoj de la instrumentoj muzikaj:

1 akordiono, 2 citro, 3 fagoto, 4 flaĝoleto, 5 fluto, 6 piano, 7 gitaro, 8 gongo, 9 gurdo, 10 ksilofono, 11 buŝkarmoniko (ĉu mistajpo anstataŭ *buŝharmoniko*?), 12 harpo: kordo, 13 hobojo, 14 klariono, 15 klarneto, 16 kontrabaso, 17 sakŝalmo, 18 mandolino, 19 saksofono, 20 tamtamo, 21 timbalo, 22 trombono, 23 trumpeto, 24 tubjo, 25 violono, 26 violonĉelo, 27 aldo, 28 tamburo.

Verŝajne mankas kelkaj instrumentoj. kaj eblas, ke oni konas instrumenton per alia nomo. Se tiu estas la kazo, bonvolu sciigi min, kaj ni disukutos la aferon. Ne mankas tiuj, kiuj diras, ke **la aferon jam oni ne plu povas tuŝi, se PIV jam *dixit***, sed PIV nur povas sankcii *bonan uzon* de vortoj en aparta fako, kaj niajn proponojn ni interkonsentos, se la argumentoj pri ili estas koheraj kaj bone prezentataj. Oni ne forgesu, ke PIV-on eldonas SAT, kaj SAT estas kontraŭ dogmo.



**Kajeroj el la Sudo**

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

| | |
|---|---|
| REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** Tfn° (00 34) 658 166 323 | **Retskribu al jesuo@ono.com** |
| **http://www.iespana.es/kajeroj.htm** | |
| **http://storm.prohosting.com/jesuo Esperanto@iespana.es** | |

# SAT

GVIDREZOLUCIO

La 75-a Kongreso de SAT, okazinta en Alikanto (ES) de la 1-a ĝis la 7-a de julio 2002, petas, ke la PK

- plu gardu la sendependecon de SAT en la rilatoj kun ĉiaj aliaj organizaìoj,
- Ĝis la venonta kongreso publikigu la regularon pri la rilatoj inter Plenum-Komitato kaj Organiza Kongresa Komitato por la organizo de niaj kongresoj, precipe pri ties financa flanko.
- atentigu la OKK-on, ke la programeroj de la kongresoj respondu al la celoj de SAT, kiel difinitaj en la artikolo 1 de ĝia Statuto.
- plu sekvu la aferojn de Billy Waldon kaj de la malliberigitoj de la grupo «Portos».

La Kongreso proponas ke :

- la propon-komisiono ricevu la taskon proponi tagordon dum la unua laborkunsido;
- la raporto de la PK estu ekzamenata kiel tuto, eventualaj amendoj estu prezentitaj skribe kaj la diskuto pri tiu raporto ne superu la daŷron de unu horo;

La kongreso aprobas la decidon de la Ekologiista Frakcio krei datumbankon pri ekologiaj normoj.

# UEA

La 87a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Fortalezo (Brazilo) de la 3a gis la 10a de augusto 2002 kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo “Diverseco — sanco ne minaco”,

**Konstatas**, ke la dauranta integrigo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankau al malegalecoj kaj al la ciam pli rapida perdigo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

**Gratulas** UNESKOn pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrina Lingvo je la 21a de februaro ciujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Generala Konferenco alprenis je la 2a de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

**Konstatas**, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neutrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca intersango de kulturaj valoroj,

**Atentigas** en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-movado kunlabori kun ciuj organizajoj, kiuj okupigas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Ankaŭus'.**